tejo

# Protokolo

## Komitata Kunveno (KoKu) de TEJO

## Hibride: Šventoji, Litovio / Zoom

19-a de Aŭgusto 2024, 14:30 loka tempo / 11:30 UTK

### Tagordo

| # | Tagordero | Subtemoj | Daŭro |
|---|---|---|---|
| 1 | Malfermo kaj klarigo de la proceduroj | Elekto de la Propona Teamo | 15 min |
| | | Elekto de la Voĉdona Teamo | |
| 2 | Tagordo | Fikso de cetera tagordo | 10 min |
| 3 | Reglamentŝanĝoj pri Komitatanoj Ĉ | Elekto de Komitatanoj Ĉ en la ordinara kunveno de TEJO | 10 min |
| | | Ofico de Komitatanoj Ĉ ĝis inkluzive la ordinaran kunvenon de TEJO | 10 min |
| 4 | Nova Estraro | Prezento/konfirmo de novelektita Estraro | 15 min |
| | | Propono pri alelekto de nova(j) estrarano(j) | 15 min |
| 5 | Estraraj raportoj | Jara raporto | 30 min |
| | | Financa raporto | |
| 6 | Deklaroj | Manifesto de Šventoji | 15 min |
| 7 | Reglamentŝanĝoj | Reglamentŝanĝo pri malfermaj alvokoj | 20 min |
| | | Reglamentŝanĝo pri retaj voĉdonadoj | 15 min |
| 8 | Komitatanoj Ĉ | Alelekto de novaj Komitatanoj Ĉ | 15 min |
| 9 | Elekta Komisiono | Elekti la Elektan Komisionon | 15 min |
| 10 | Invitoj | Projektoj.org, serĉata nova TEJO-volontulo, ideoj por sekva mandato, ks | 5 min |
| 11 | Ceteraĵoj | | 10 min |
| 12 | Fermo | | |

Protokolas: Héloïse.

Prilaboras la protokolon: Manuela.

# 1. Malfermo kaj klarigo de la proceduroj

Michael Boris Mandirola, kiu estis elektita kiel kunsidestro per voĉdonado en Centra Reto, malfermas la kunvenon. Li klarigas ke partoprenantoj povos voĉdoni per manlevo aŭ respondante enketilojn en Zoom, aŭ, kaze de pli kompleksaj voĉdonadoj, ankaŭ per Centra Reto post la kunveno. Homoj kiuj rajtas esprimi du voĉojn (por si mem kaj por anstataŭata persono) estos petataj levi du manojn kiam ili voĉdonos por akcepto de propono.

## 1.1. Elekto de la Propona Teamo

Michael Boris prezentas la rolon de la Propona Teamo kaj klarigas kiu rajtas kandidatiĝi. Jonathan kaj Jaime kandidatiĝas.

> *La Komitato akceptas Jaime Tapia Zaragoza kaj Jonathan Schneider kiel membrojn de la Propona Teamo de ĉi tiu Komitatkunsido..*
>
> Ĉeeste: 13 por, 0 kontraŭ, 1 sindetene. Rete: 6 por, 0 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La propono estas akceptita.

## 1.2. Elekto de la Voĉdona Teamo

Michael Boris klarigas pri la rolo de la Voĉdona Teamo. Li rekomendas ke estu unu teamano fizike en Šventoji kaj alia teamano rete en Zoom. Ines kaj Pjotr kandidatiĝas.

> *La Komitato akceptas Ines Kahin kaj Pjotr de Mulder (Delfenon) kiel membrojn de la Voĉdona Teamo de ĉi tiu Komitatkunsido.*
>
> Ĉeeste: 18 por, 0 kontraŭ, 0 sindetene. Rete: 5 por, 0 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La propono estas akceptita.

# 2. Tagordo

## 2.1. Fikso de cetera tagordo

La planita tagordo estis prezentita retmesaĝe antaŭ la kunsido kaj estas denove prezentata de KuboF. Tyron prezentas novan tagordon kun aldonaj tagorderoj. Li proponas ŝanĝon en la Reglamento pri Komitatanoj Ĉ. Li ankaŭ prezentas tagorderojn pri la nova Estraro, la Manifesto de Šventoji, malfermaj alvokoj, elektoj de Komitatanoj Ĉ kaj elekto de la nova Elekta Komisiono. Jonathan proponas aldonon de voĉdonado pri la periodo de la elekto de Komitatanoj, kiu povu esti mallongigita al 24 horoj.

> *La Komitato aprobas la amenditan tagordon.*
>
> Evidenta plimulto por en la kunsidĉambro. Rete: 3 por, 1 kontraŭ, 1 sindetene.
>
> La amendita tagordo estas akceptita.

# 3. Reglamentŝanĝoj pri Komitatanoj Ĉ

## 3.1. Elekto de Komitatanoj Ĉ en la ordinara kunveno de TEJO

Tyron proponas ke Komitatanoj Ĉ estu elektitaj dum la ordinara kunveno de TEJO, en IJK. La propono estas subtenata de Ĝojo. Por tio, ŝanĝo devus okazi en la Reglamento pri la Komitato, sub punkto 15, kiu nomiĝas Elekto de Komitatanoj Ĉ. Snehaĝa proponas aldoni ke la kandidatoj ĉeestu rete aŭ fizike en la kunveno en kiu ili volas elektiĝi, sed Michael Boris proponas voĉdoni pri tio aparte.

> *La elekto de Komitatanoj Ĉ povas okazi per reta voĉdono (kun almenaŭ 15 tagoj inter la anonco kaj la voĉdonado, dum kiu tempo eblas kandidatiĝi) aŭ dum ordinara komitatkunveno.*
>
> Ĉeeste: 17 por, 0 kontraŭ, 0 sindetene. Rete: 4 por, 1 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La propono estas akceptita.

Michael Boris rekomendas al la partoprenantoj varbi tuj homojn por Komitatanoj Ĉ, ĉar pli poste dum la kunveno oni diskutos pri kandidatoj.

Pjotr apogas la aldonon proponitan de Snehaĝa por tiu reglamenta punkto. Ĝojo proponas ke, se la kandidato ne povas ĉeesti, tiu anticipe sendu vivresumon aŭ memprezenton. Patricio apogas ke la kandidato povu sendi anticipe kandidatiĝdokumenton.

*La elekto de Komitatanoj Ĉ povas okazi per reta voĉdono (kun almenaŭ 15 tagoj inter la anonco kaj la voĉdonado, dum kiu tempo eblas kandidatiĝi) aŭ dum ordinara komitatkunveno, se la kandidato ĉeestas ĝin rete aŭ ĉeeste, aŭ anticipe sendis kandidatiĝdokumenton.*

Ĉeeste: *[neklara sonregistraĵo]*. Rete: 4 por, 1 kontraŭ, 1 sindetene.

La propono estas akceptita.

## 3.2. Ofico de Komitatanoj Ĉ ĝis inkluzive la ordinaran kunvenon de TEJO

Tyron proponas ke Komitatanoj Ĉ estu elektitaj ĝis inkluzive la ordinaran kunvenon de TEJO, en IJK, ne plu ĝis la 31-a de majo. Patricio malkonsentas, ĉar tio povas kompliki la renovigon kaj ankaŭ krei dubojn pri la aĝlimoj por la komitatanoj. Por eviti tiun problemon, KuboF proponas ke ili oficu ĝis la 31-a de aŭgusto, Paulina subtenas tiun aldonon pri ekzakta dato.

*En la Ĝenerala Reglamento, punkto 6 pri Komitatanoj Ĉ, frazo 3 ("Komitatano Ĉ oficas ekde sia elektiĝo ĝis la sekva 31-a de majo, sed povas esti reelektita"), la Komitato akceptas ŝanĝi la vortumon al "Komitatano Ĉ oficas ekde sia elektiĝo ĝis la 31-a de aŭgusto, sed povas esti reelektita".*

Ĉeeste: 15 por, 0 kontraŭ, 2 sindetene. Rete: 4 por,  2 kontraŭ, 0 sindetene.

La propono estas akceptita .

# 4. Nova Estraro

## 4.1. Prezento/konfirmo de novelektita Estraro

Tyron petas parolvicon kaj invitas la novajn estraranojn kiuj ĉeestas en IJK paroli iom pri siaj planoj. La nova prezidanto, KuboF, parolas pri ekzisto de ekdiskuto pri la divido de la estraraj roloj kaj pri la intenco havi stabon kun kvin plentempaj oficistoj. Li mencias la planon uzi novan retan mastruman sistemon de TEJO, kiu povos esti uzata ankaŭ de ĝiaj landaj kaj fakaj sekcioj. Ikvero prezentas sin, mencias ke li havis sperton en BEJO kiel sekretario; li estis elektita kiel sekretario de TEJO, post esti senofica estrarano en TEJO.

Pjotr havas demandon al la kandidatoj pri dungaj planoj. Ikvero esprimas sian singardemon pri oportunoj, surbaze de la ĉi-jara situacio, en kiu ekzistis alloga oportuno por havi kvin oficistojn, sed laŭ li ne indis profiti tiun oportunon, kiu ankaŭ venas kun financaj riskoj. KuboF konsentas.

Espoir demandas kiu estas la strategio de la nova Estraro por kunlabori kun la Afrika Unio. KuboF diras ke estis plano listigi oportunojn de subvencipetoj ekster Eŭropa Unio, li ne havis tempon trakti tion pro sekretariaj taskoj, sed planas labori pri tio dum sia prezidanteco, por esplori pri subvenciaj oportunoj ne nur en Afriko, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj. Li ankaŭ parolis pri sia partopreno en UK en Tanzanio kaj la potencialo de la afrika kontinento, kie li rimarkas viglan junularon. Nuntempe TEJO ne estas registrita en Afriko, sed esplorado pri la necesaj paŝoj estas planata.

## 4.2. Propono pri alelekto de nova(j) estrarano(j)

Tobiasz parolas nome de la Elekta Komisiono, li diras ke ili ricevis sufiĉe lastmomentan kandidatiĝon kaj ne havis tempon por pretiĝi kaj fari rekomendon pri tiu propono. Ili lasas al la Komitato la decidon pri kion fari koncerne al tiu kandidatiĝo.

Michael Boris demandas ĉu iu alia volas kandidatiĝi. Espoir levas la manon kaj anoncas ke li demisias de la Elekta Komisiono por kandidatiĝi al la Estraro, li intencas sendi ene de kelkaj horoj siajn kandidatiĝdokumentojn. KuboF atentigas ke, pro tio ke estis du lastmomentaj kandidatoj, oni devas havi pli da tempo, do oni voĉdonu poste rete, unue, kiom da estraranoj estu, kaj poste, pri la specifaj kandidatoj. Jaime kaj Espoir ankaŭ subtenas ke la voĉdonado okazu rete.

## Procedura propono

*La Komitato aprobas la plilongigon de la kunsido je 1 horo kaj duono.*

La propono estas akceptita per evidenta plimulto.

## Procedura propono

*La Komitato aprobas 10-minutan paŭzon de la sesio.*

La propono estas akceptita per evidenta plimulto.

## Procedura propono

*La Komitato aprobas la proceduran proponon pri fini la tagorderon 5 “Nova Estraro” sen voĉdoni.*

Ĉeeste: 14 por, 3 sindetene. Rete: 5 por, 1 sindetene.

La propono estas akceptita.

# 5. Estraraj raportoj

## 5.1. Jara raporto

KuboF prezentas lumbildojn pri la agado de TEJO kaj petas povi sendi la raporton ĝis la 31-a de oktobro. KuboF ĉeeste kaj Patricio rete pretas respondi demandojn pri siaj fakoj.

> *La Komitato aprobas prokraston de la livero de la Estrara Raporto ĝis la 31-a de oktobro 2024.*
>
> Ĉeeste: 16 por, 3 sindetene. Rete: 4 por, 1 kontraŭ, 1 sindetene.
>
> La propono estas akceptita.

## 5.2 Financa raporto

> *La Komitato aprobas prokraston de la livero de la Financa Raporto al la Komitato ĝis la 31-a de oktobro 2024.*
>
> Ĉeeste: 16 por, 1 kontraŭ, 0 sindete. Rete: 5 por, 1 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La propono estas akceptita.

# 6. Deklaroj

## 6. 1. Manifesto de Šventoji

Pjotr enkondukas la manifeston de Šventoji. Li klarigas ke li ne estis ĝia iniciatinto, sed povas paroli koncize pri ĝi. La manifesto estas rezulto de kunlaboro inter homoj de UEA, ILEI kaj TEJO, kiel iniciato de Patricio. Ĝi estas farata ankaŭ lige kun la 70-jariĝo de la deklaracio de UNESKO pri Esperanto, en Montevideo. Ĝi estas verkita kune de aktivuloj de UEA, ILEI, TEJO kaj aliaj esperantistaj asocioj. Ikvero laŭtlegas la manifeston. Pjotr legas mesaĝon de Patricio, kiu petas la opinion de la kunsidantoj pri kiel nomi la tekston, ĉu manifesto, rezolucio aŭ deklaro. La vorto "manifesto" estas favorata de komentantoj.

Pjotr proponas ŝanĝon en la konkludo ("estu kerna celo de la esperantista movado plifortigi siajn ligojn kun UNESKO…"), por pli konkrete diri kiuj asocioj laboros por realigi la celojn de la manifesto. Patricio kontraŭas parolante pri kiom malfacile estis kolekti subskribojn de esperantistaj asocioj por la peticio de TEJO al Duolingo. Ikvero esprimas subtenon por la

nuna konkludo senŝanĝe. Patricio komentas ke la subskriboj povos esti aldonataj post la prezentado de la manifesto en la memorfesta evento de Montevideo.

Pjotr prezentas jenan revortumon de la lasta manifesta frazo por aprobo:

> *Konklude estu kerna celo de la asocioj kiuj kune kun TEJO subskribas jenan manifeston plifortigi siajn ligojn kun UNESKO, ĝiaj membroŝtatoj kaj aliaj internaciaj instancoj cele al la plibonigo kaj plijustigo de komunikado en internaciaj rilatoj.*
>
> Ĉeeste: 4 por, 8 kontraŭ, 10 sindetene. Rete: 4 por, 1 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La amendpropono estas malakceptita.

KuboF proponas aldonan lingvan ŝanĝon, anstataŭ "mejloŝtono" estu "kilometroŝtono". Tyron kontraŭas, klarigante ke la vorto "kilometroŝtono" ne estas uzata.

> *La Komitato aprobas la uzon de la vorto "kilometroŝtono" anstataŭ "mejloŝtono".*
>
> Ĉeeste: 5 por, 6 kontraŭ, 6 sindetene. Rete: 2 por, 3 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La propono estas malakceptita.

Okazas la fina voĉdono pri la manifesto.

> *La Komitato aprobas la tekston nomitan "Manifesto de Šventoji" prezentitan de Patricio.*
>
> Ĉeeste: 23 por, 0 kontraŭ, 2 sindetene. Rete: 5 por, 0 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La propono estas akceptita.

# 7. Reglamentŝanĝoj

## 7.1. Reglamentŝanĝo pri malfermaj alvokoj

Tyron klarigas kial li proponas forigi la sekcion pri malfermaj alvokoj en la Reglamento. Laŭ tiu sekcio, TEJO devas fari publikan alvokon en ĉiuj siaj komunikiloj dum almenaŭ unu semajno kiam temas pri gvida aŭ oficista posteno, subvencioj, repagoj aŭ rekompencoj. Li parolas surbaze de praktikaj ekzemploj de la lastaj du jaroj, por la efikigo de la laboro.

Jonathan demandas kial ne konservi la sekcion de la Reglamento por normalaj kazoj, kiam ankoraŭ ne ekzistas klare ideala kandidato por posteno. Tyron klarigas ke li ne volas pezigi la Reglamenton per aldono de esceptaj kazoj kaj ke ĉiukaze kontrolo jam okazas ĉar por dungoj la Estraro devas voĉdoni. Pjotr forte kontraŭas la forigon de la reguloj pri malfermaj alvokoj, ĉar ĝi iras kontraŭ la streboj malfermi TEJO-n al la tutmonda junularo. Mikaelo ankaŭ kontraŭas forigi la regulojn komplete, li anstataŭe preferas amendon de la sekcio, kun taŭgaj

kriterioj pri kiam fari malfermajn alvokojn kaj kiam ne. Patricio ankaŭ argumentas ke la malfermaj alvokoj devas resti, por travidebleco. KuboF substrekas ke malfermaj alvokoj signifas burokrataĵojn kaj aldonan laboron, sed ke havi malfermajn alvokojn estas grave por malfermiteco; li ne havas fortan opinion, sed subtenas plifajnigon, ne forigon de la reguloj pri malfermaj alvokoj. Jonathan ankaŭ subtenas aldoni kondiĉojn por situacioj en kiuj la alvokoj ne estu bezonataj. Ines diras ke la alvokoj ebligas scii pri oportunoj de TEJO. Tyron emfazas ke jam estas multaj kondiĉoj en la Reglamento pri malfermaj alvokoj kaj ke ĉiukaze la reguloj estas relative novaj, aprobitaj antaŭ tri jaroj. Giulia petas klarigojn pri kiel la dungoj okazis antaŭe, ĉar kiel nova komitatano ŝi ne bone konas la antaŭan situacion.

## Procedura propono

*La Komitato aprobas la plilongigon de la kunsido je 30 minutoj.*

Evidenta plimulto.

La propono estas akceptita.

La Komitato daŭrigas la debaton pri malfermaj alvokoj. Pjotr laŭtlegas mesaĝon de Patricio, laŭ kiu la forigo de la reguloj pri malfermaj alvokoj favoras amikojn kaj arbitrajn decidojn. Tyron klarigas ke en la Estraro estas homoj de pluraj kontinentoj kaj diversaj aĝoj kaj en la praktiko ne vere eblas havi komunan amikon por favori.

*La Komitato aprobas la forigon de la sekcio pri malfermaj alvokoj.*

Ĉeeste: *[neklara sonregistraĵo]*. Rete: 0 por, 4 kontraŭ, 1 sindetene.

La propono estas malakceptita.

Tyron faras novan proponon, por aldoni klaŭzon laŭ kiu la Estraro rajtas ne fari malferman alvokon por specifa posteno, sed en tiu kazo ĝi devas informi la Komitaton. Mikaelo kaj Patricio proponas diskuti pri tio interrete post la kunveno. Ĝojo rimarkigas pri la riskoj de la nova propono, vidante eblan kazon en kiu komitatano petas voĉdonon kaj oni daŭre devas atendi por dungo. Paulina konsentas kun la propono de Tyron, ĉar ĝi kontribuas al la travidebleco. Espoir subtenas ke la voĉdonado estu farita rete poste, ĉar tiel aliaj komitatanoj, kiuj nun ne povas ĉeesti, povas veni kun pliaj ideoj. Tyron volas voĉdonadon nun, ĉar per laborgrupo post la kunsido eblas ke oni ne alvenos al baldaŭa aŭ klara rezulto.

*La Komitato aprobas la ŝanĝon en la Reglamento "La Estraro rajtas ne havi malferman alvokon, sed en tiu kazo ĝi devas informi la Komitaton".*

Ĉeeste: 9 por, 4 kontraŭ, 4 sindetene. Rete: 1 por, 4 kontraŭ, 0 sindetene.

La propono estas malakceptita. Ĉar la propono ne estis sendita unu semajnon antaŭ la kunveno, necesus dutriona plimulto, sed ĝi ne ekzistas ĉi-foje.

## 7.2. Reglamentŝanĝo pri retaj voĉdonadoj

Jonathan parolas pri la daŭro de kelkaj voĉdonadoj, kiuj estas sufiĉe longaj, kaj li proponas ke la daŭro povu esti mallongigita al 24 horoj. Tiu eblo jam ekzistas, sed nur por specifaj kazoj, kiam la voĉdonado komenciĝas dum kunveno. Patricio proponas ke tiu diskuto okazu poste en la komitata listo. Pjotr parolas pri la lasta reta kunveno, li konsideras ke oni ne devu povi havi 24-horan voĉdonadon por temoj kiuj ne estis anticipe aldonitaj al la tagordo, ĉar ankaŭ la komitatanoj kiuj ne sukcesas partopreni kunvenon devas havi tempon por informiĝi. KuboF taksas ke ne taŭgas voĉdoni haste pri tiu temo kaj faras proceduran proponon por haltigi la tagorderon sen voĉdono.

## Procedura propono

*La Komitato aprobas fini la nunan tagorderon sen voĉdonado.*

6 por, 0 kontraŭ, 10 sindetene. Rete: 5 por, 0 kontraŭ, 0 sindetene.

La propono estas akceptita.

## 8. Komitatanoj Ĉ

## 8.1. Alelekto de novaj Komitatanoj Ĉ

La partoprenantoj estas invitataj proponi homojn por Komitatano Ĉ. Tyron proponas sin. KuboF proponas ke la novaj Komitatanoj Ĉ ekoficu la 1-an de septembro, por ke Tyron ne devu demisii por komitataniĝi.

## Procedura propono

*La Komitato aprobas la plilongigon de la kunsido je 30 minutoj.*

13 por, 6 kontraŭ, 2 sindetene. Rete: 3 por, 2 kontraŭ, 0 sindetene.

La propono estas akceptita.

La serĉado de kandidatoj daŭras, je instigo de la kunsidestro, kiu invitas la partoprenantojn de la kunveno serĉi taŭgajn kandidatojn en la kongresejo kaj interrete. Ĝojo proponas Hanson, Tyron proponas Tuŝka, Jaime ankaŭ kandidatiĝas. Patricio esprimas bedaŭron ke

junuloj kiuj ne estas en IJK ne havas la eblon kandidatiĝi, li proponas ke pri tiu voĉdonado oni informu en la komitata listo. Michael Boris atentigas ke kandidatoj povas ankaŭ prezentiĝi interrete. Ŝujano kaj Valentin aldoniĝas al la kandidatoj. Tyron atentigas ke normale estas malfacile trovi kandidatojn, do oni profitu nun en IJK ke estas pluraj. Michael Boris demandas kiom da Komitatanoj Ĉ povas esti elektitaj, KuboF diras ke kvin.

> *La Komitato aprobas la elekton de kvin Komitatanoj Ĉ.*
>
> Ĉeeste: evidenta plimulto. Rete: 3 por, 1 kontraŭ, 0 sindetene.
>
> La propono estas akceptita.

Tyron proponas fari rete la voĉdonadon pri kiuj estu la komitatanoj kaj ke tiu voĉdonado daŭru 24 horojn. KuboF petas ke oni aldonu proponon pri reta voĉdonado al la tagordo de la kunsido, por eviti longan debatan fazon, kiu alikaze devus okazi poste.

Michael Boris invitas la kandidatojn prezenti sin. Tuŝka sciigas ke ŝi estas organizanto de IJK kaj ke ŝi devas foriri pro IJK-laboraĵoj. Tyron prezentas sin, diras ke li estis en la Estraro dum du jaroj kaj duono, li volas helpi la Komitaton per sia sperto kaj siaj kapabloj. Valentin parolas pri sia agado en TEJO, dum du jaroj kiel estrarano kaj unu jaro kiel volontulo. Ŝujano enkondukas sin, klarigas ke li estis gajninto de Partoprenu IJK-n kaj helpanto de Retoso 2024, li volas varbi pri la Esperanta movado en Ĉinio. Sekvas Jaime, kiu esperantistiĝis antaŭ multaj jaroj, sed aktiviĝis en la movado antaŭ nelonge; li estas anstataŭanto de Pol en la kunveno (Komitatano A por Katalunio) kaj estrarano pri eksteraj rilatoj de la kataluna junularo. Hanso ne plu ĉeestas, sed Tobiasz parolas pri lia vasta sperto en la movado (komitatano de UEA, estrarano de TEJO, membro de la Elekta Komisiono de TEJO).

> *La Komitato aldonas proponon pri reta voĉdonado por Komitatanoj Ĉ al la tagordo de tiu ĉi kunsido.*
>
> Evidenta plimulto.
>
> La propono estas akceptita.

Intertempe okazas diskuto pri la elekto de la nova Elekta Komisiono, pli ekzakte kiam tio devus okazi. Tobiasz donas sian interpretadon, laŭ kiu la malnova Elekta Komisiono oficas ĝis la nova estraro estas plene elektita; tio laŭ li ankoraŭ ne okazis.

## Procedura propono

> *La Komitato aprobas la plilongigon de la kunsido je 15 minutoj.*
>
> Ĉeeste: 11 por, 2 kontraŭ, 2 sindetene.

Okazas teknikaj problemoj kiuj malebligas la starigon de voĉdonadoj en Zoom, sed ĉi-kaze la reta voĉdonado ne ŝanĝus la rezulton. La ĉeestantoj en Zoom esprimos siajn voĉojn per levo de mano dum la voĉdonadoj.

La propono estas akceptita.

Sekvas la voĉdonado pri la elekto de Komitatanoj Ĉ.

*La Komitato decidas elekti Komitatanojn Ĉ, kun ekofico la 1-an de septembro 2024, pere de reta voĉdono kun daŭro de 24 horoj komenciĝanta dum la kunsido.*

Evidenta plimulto.

La propono estas akceptita.

# 9. Elekta Komisiono

## 9.1. Elekti la Elektan Komisionon

Pjotr demandas ĉu oni rajtas proponi sin mem. Li proponas sin mem kaj esprimas deziron ke la aliaj membroj estu pli spertaj kolegoj. Michael Boris atentigas ke tiukaze iu alia devus transpreni la rolon de Pjotr en la Voĉdona Komisiono.

*La Komitato akceptas aldoni Tobias Nowak al la Voĉdona Teamo por anstataŭi Pjotr.*

Evidenta plimulto.

La propono estas akceptita.

Utku rimarkigas ke, se oni estas en la Elekta Komisiono, oni ne rajtas kandidatiĝi por estrarano, oni bone konsciu pri tio. Michael Boris invitas Pjotr repripensi tiun decidon. Al la aliaj partoprenantoj, por la serĉado de kandidatoj, li klarigas ke ne nepras ke la membroj de la Elekta Komisiono estu komitatanoj de TEJO. Estas menciitaj kelkaj nomoj, sen klaraj akceptoj, kaj Tyron proponas ke tiu diskuto okazu retliste, ĉar restas malmulte da tempo. La tagordero finiĝas sen voĉdono.

# 10. Invitoj

## 10.1. Projektoj.org, serĉata nova TEJO-volontulo, ideoj por sekva mandato, ks

Tyron invitas la partoprenantojn ĉeesti la TEJO-programerojn dum la cetero de IJK. KuboF invitas la partoprenantojn serĉi lin aŭ Karlos se ili volas esti novaj TEJO-volontuloj. Li mencias pri sia trejnado rilate OpenProject (Projektoj.org) kaj invitas homojn ĉeesti ĝin en IJK. Li ankaŭ invitas la partoprenantojn voĉdoni en Centra Reto, kie la novaj voĉdonoj estis ĵus starigitaj.

# Fermo

Michael Boris atentigas ke la horo estas 19.15. La kunveno finiĝas kaj la kunsidestro dankas la partoprenantojn.